



Majo

2025

Rubrikaj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Recenzo
- Lasta paĝo

Esperanto-Informilo



Foto: G. Hennemann,
la 5-an de majo '25.

Videblas akvokastelo
Adolfsburg rande de
vilaĝo Oberhundem
en la natura parko
Sauerland-
Rothaargebirge, kiu
estas la plej granda
naturparko en
Germanio kun areo de
4 215 km²

[https://de.wikipedia.org/
wiki/Naturpark_Sauerland-
Rothaargebirge](https://de.wikipedia.org/wiki/Naturpark_Sauerland-Rothaargebirge)

Kolofono:
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.

c/o Georg Hennemann
Rehgartenstrasse 16
35683 Dillenburg
Tel.: 02771 8196614

Mesaĝo de la prezidanto:

La koalicia kontrakto inter la regontaj partioj CDU/CSU kaj SPD estas subskribita kaj jam multflanke kritikata. Ni ĉiuj estos direkte aŭ malrekte trafita aŭ eĉ implicita, tamen ne lasu vin tiom maltrankviligi - ekkomencas ja la mojosa majo kun multaj eventoj kaj sia speciala varma etoso.

Distran legadon,
G. Hennemann, 5-an de majo 2025

Unua mardo

La 6-an de majo 2025

ekde la 19-a horo: Sentema babilado per Zomo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Dua mardo

La 13-an de majo 2025

ekde la 19-a horo: Interna babilado per Zomo

Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

Tria mardo

Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 20. Mai, 2025

Mardo, la 20-an de majo, 2025

19:00 h

Mitgliederversammlung

Membrokunveno

Mardo, la 27-an de majo, 7pm

ekde la 19-a horo: „Senprograma samideana babila renkontiĝo“
Stattcafé, Gremppstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm en Frankfurto je Majno

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, <https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745>,


https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg

Anoncoj:

- 20.5.25 19:00 Uhr Membrokunveno en Saalbau MÜZ
- 28.7. - 17.8.25 Ferioj Saalbau MÜZ Schönhof

La elstara foto (sendita de U. Fellmann)

“Ĵus survoje vidite”



Varbado kun fotoj de la ĝemelaj urboj Frankfurto kaj Guangzhou sur la fenestra vitro de la S-Bahn linio en Frankfurto.

Eseo: Kion la koalicia kontrakto malenhavas

Opinia eseo de G. Hennemann

Verŝajne neni de ni nek havas la tempon nek la ambicion legi la tutan koalician kontrakton de 146 paĝoj, kiu oficiale titolas "Respondeco por Germanio - Koalicia interkonsento inter CDU, CSU kaj SPD". Ĉiuokaze estas interese sciigi niajn legantojn, kiajn temojn la kontrakto ne enhavas aŭ pri kio la koaliciaj partioj ŝajne ne volas decidi dum la venontaj kvin jaroj. Mi nur volas mencii la gravan temon de fidindeca kaj nepoluanta energiprovizo, kio miaopinie ankaŭ inkluzivas nuklean energigeneradon: neni vorto pri tiu grava temkampo krom la malkonvinkeca tezo "Ni reguligas fuziajn elektrocentralojn ekster nuklea juro", sed sen plie motivigi tiun decidon. Mi citas el la inĝenierteknika germana magazeno VDI-Nachrichten: "La koalicia interkonsento de la nova federacia registaro ne enhavas eĉ unu vorton pri nuklea energio, fina aŭ provizora stokado. Sed prokrasti ĝin (tiun temon) por longa tempo ne estas solvo." Ankaŭ ne iu vorto pri novgeneraciaj malgrandaj modulaj reaktoroj (angle: small modular reactors, SMR), kiuj baldaŭ povus anstataŭigi energicentralojn forbrulante fosiliajn brulaĵojn; aŭ povos helpi kovri la kreskantan bezonon de energio por elektromobileco, por hejtado aŭ malhejtado de konstruaĵoj per elektraj varmopumpoj - ne forgesante la elektroenergion bezonatan en komputejoj kaj kalkulcentroj por kovri la bezonon de la interreto kaj de artefarita aŭ generpova inteligento. Ĉu tiu flankenlaso estas naiveco aŭ pura blindeco? Mi ne scias, sed mi scias ke tiu politiko de

elkrampigo ne fruktodonas por nia demokratio. Kial ni ne povis solvi ĉi tiun debaton? Kial ni havas la samajn bazajn argumentojn dum kvindek jaroj, sen rimarko de iuj fundamentaj restrukturadoj de la teĥnologio ekde la 1970-aj jaroj? La respondo estas, ke ni fakte ne kapablis. La rakonto pri nuklea energio proponita de la plej laŭtaj subtenantoj ne estas scienca sed scienceca. Ĝi estis rakonto pri teĥnokratoj flankenpuŝantaj la publikon, elektante studojn kun la plej favoraj supozoj enkonstruitaj, kaj deklarante kiel "sekura" estas la reaktordezajno, kiu esence emas al katastrofo. Tamen estas ankaŭ tro frue forlasi nuklean energion pogrando. Kiel civitanoj kaj politikistoj povas superi la blokiĝon por evoluigi nukleajn teĥnologiojn, kiuj profitigas pli da homoj kaj precipe la subevoluita tria mondo? La ekzameno de la teĥnokrataj radikoj de la nuna teĥnologio nur malhelpas - ni skizu vojojn por revenigi demokratiojn al la debato, permesante al socioj realigi la plej bonan, kion nuklea energio povas oferti. Se ni ne povas progresi rilate al nuklea energio — kaj fari tion demokratie — ŝajnus esti malmulta espero por simile kompleksaj defioj: klimata ŝanĝo, artefarita inteligento, kolapsanta biodiverseco, sendado de homoj al Marso. Ni devas fini la nuklean blokiĝon. Ĉu la demokratia diskuto pri estonte bezonataj energiformoj povas esti decida testo por demokratio kaj por la homaro?

Kaj en variacio de konata indiana saĝeco la aŭtoro de la libro `Nuklea energio nun sed konvene´ (germane: `Atomkraft jetzt aber richtig´), Manfred Haferburg, diris: *"Nur kiam la lasta elektrocentralo estis malkonstruita, la lasta karbominejo inundita, la miliona ventoturbino konstruita, kaj la lasta kvadrata kilometro kovrita per sunpaneloj, ni komprenis, ke elektro ne venas el la ŝtopilo..."*

Ligiloj

<https://www.wiwo.de/downloads/30290756/8/koalitionsvertrag-2025.pdf>

<https://www.vdi-nachrichten.com/technik/energie/kernenergie-bleibt-fuer-bundesregierung-aussen-vor/>

<https://www.tech-for-future.de/klimaschutz-politik/>

<https://t3n.de/news/kernreaktor-wird-waehrend-des-betriebs-aufgetankt-1683951/>

<https://t3n.de/news/thorium-kernreaktor-china-1408062/>

<https://www.energy.gov/ne/articles/southern-company-and-terrapower-prep-testing-molten-salt-reactor>

<https://www.handelsblatt.com/politik/international/atomgipfel-von-der-leyen-und-14-eu-staaten-sprechen-sich-fuer-atomkraft-aus/100026321.html>

<https://www.handelsblatt.com/meinung/kolumnen/energie-kernkraft-muss-auf-die-agenda-der-schwarz-roten-koalition/100123881.html>

<https://www.heise.de/news/Bill-Gates-Terrapower-will-US-Rechenzentren-mit-Kernenergie-betreiben-10255142.html>

<https://www.heise.de/news/KI-Strombedarf-Meta-sucht-Projektentwickler-fuer-neue-Atomkraftwerke-10187825.html>

<https://www.heise.de/news/Atomstrom-fuer-KI-Rechenzentren-Microsoft-laesst-Three-Mile-Island-reaktivieren-9939236.html>

<https://www.heise.de/news/Amazon-com-Google-Microsoft-KI-lechzt-nach-Atomstrom-5019580.html>

Diversaĵoj

Ŝerco (trovita de Georg):

La instruisto al lernantino:

"Jana - mi esperas, ke mi ne plu kaptos vin kopiante!"

Jana tiam respondas:

"Jes, mi ankaŭ esperas tion!"

Proverbo de la monato (elektita de G. Hennemann)

Hodiaŭ mi volas prezenti proverbon kiu iel rilatas al ĉiuj, ĉar ni bone regas ekskludi aferojn kiuj ne direkte implicas nin.

[zam-853.01] Min ne tuŝas la afero, mi staras ekstere.

Parenca(j) proverbo(j)

1526	Mi flanke sidis, mi ne aŭdis nek vidis
1530	Mi lavas al mi la manojn
1702	Ne mia estas la ĉevalo, min ne tuŝas ĝia falo

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_001539.htm

Enigmoj (faritaj de Ulriko)

Solvo de la aprilo-esperantinformila enigmo

La tasko estis eltrovi plurajn nombroseriajn regulojn. La demando estis, kiuj estas la po sekvantajn du nombrojn al ĉiu de la sekvaj vicoj:

- (1) 1, 3, 5, 7, 9, 11, 13, ...
- (2) 3, 6, 12, 24, 48, 96, ...
- (3) 1, 4, 9, 16, 25, 36, 49, ...
- (4) 1, 3, 6, 10, 15, 21, ...
- (5) 1, 2, 6, 24, 120, 720, ...
- (6) 2520, 1260, 840, 630, 504, ...
- (7) 1, 1, 2, 3, 5, 8, 13, ...
- (8) 1, 3, 7, 15, 31, 63, 127, ...
- (9) 1, 3, 7, 13, 21, 31, 43, ...
- (10) 2, 0, 0, 2, 6, 12, 20, ...
- (11) 518, 262, 134, 70, 38, 22, ...
- (12) 0, 414, 732, 0, 236, 449, 645, ...

Solvoj:

- (1) 15, 17
- (2) 192, 384
- (3) 64, 81
- (4) 28, 36
- (5) 5040, 40320
- (6) 420, 360
- (7) 21, 34
- (8) 255, 511
- (9) 57, 73
- (10) 30, 42
- (11) 14, 10
- (12) 828, 0

La venkinto estis Reinhard, kiu solvis dek el la 12. Por la unuaj 11 li donis la ĝustajn regulojn, sed miskalkulis unufoje, je la 6-a serio. La 12-an li ne solvis (ankaŭ ne mi), tiu estis la entjera parto de miloblo de la decimala parto de kvadrata radiko de ĉiu entjero (sonas pli komplike ol estas... rigardu la nombrojn du kaj tri, eble vi jam rekonas ilin de ie...).

Ekzemple:

Radiko el 1 = 1,000, rezulto: 0.

Radiko el 2 = 1,414, rezulto: 414.

Radiko el 3 = 1,732, rezulto: 732.

Nova Enigmo

La sekvaj fotoj montras vindrinkejon, kiu nomiĝas "Esperanto". La fotisto vizitis ĝin en la jaro 2021. Li inter alie raportis pri tiu vizito, ke li multe drinkis. Sur la menuo tie troviĝas kokteloj havantaj nomojn kiel ekz-e "Anna Löwenstein" kaj "Lingvo de la Galaksio".

En tiu domo, kie hodiaŭ troviĝas la drinkejo Esperanto, Zamenhof dum kelkaj jaroj loĝis.


La enigmaj demandoj estas:

- (1) En kiu urbo situas tiu domo?
- (2) En kiu lando ĝi situas hodiaŭ?
- (3) Kiam Zamĉjo loĝis tie?
- (4) Kiom aĝa li tiam estis?



La recenzo: La Librejo (de Ulriko)


Nia TTT-eja Esperantosocieta babilejo ja troviĝas sur la tujmesaĝila platformo Telegram (ĝi nomiĝas Esperanto Frankfurt). Kio ankaŭ troviĝas sur Telegramo estas ne nur pluraj grandaj kaj interesaj esperantistaj babilejoj, sed la Librejo. La Librejo estas kanalo, en kiu intertempe kolektiĝis pli ol sescent elektronike stokitaj verkoj, kiujn oni povas tie legi aŭ elŝuti kaj stoki al la propra komputilo aŭ saĝtelefono. La enTelegrama adreso estas @Librejo. Intertempe, ĝi enhavas pli ol 1400 membrojn kaj entenas aktuale 655 verkojn, ĉefe romanojn, sed ankaŭ lernolibrojn, vortarojn, kaj aliajn specojn. Por doni impreson pri tio, jen kelkajn ekranfotajn por vidi, kiel la libroj tie estas prezentataj:




Jen verko priesperantohistoria, kun priskribo de la enhavo.




Jen la plej nove aperinta verko:





Jen ekzemplo pri sciencrilata instrulibro por laikoj, tradukaĵo el la franca lingvo.







Tiu libro estas instrulibro pri rolludo, kion mi proponas aĉeti de la klubo por estonte ĝin ludi.

Aldone al la kolekto de verkoj en pdf-fornato, la Librejo ofertas ofte priskribon (jen longan, jen mallongan) kaj diskutejon je ĉiu verko, en kiu oni povas diskuti pri la verko, recenzi ĝin, ktp. ..ekzemple, al tiu verko estiĝis jena diskuteto:



...kaj pri kelkaj libroj la komentoj estas simple tiaj:



Mi do povas treege rekomendi viziti tiun Librejon. Tamen, unu averton mi havas: ĉar ankaŭ aperas sufiĉe novaj verkoj tiel vendataj en la reala mondo, mi supozas, ke kelkaj de ili estas ne laŭleĝe rajtigitaj prezentitaj en la Librejo. Tiuj estas do eble pirataj eldonoj.

La speciala tago (de U. Fellmann)

La tria de majo estis duoble speciala tago: estis
Tago de Troekspluato de la Tero
kaj Monda Tago de Gazetara Libereco
Legu la Vikipediajn artikolojn pri tiuj du temoj.

La speciala monato (de. G. Hennemann)

Mi dankegas vin kara majo.
Monato verdiĝante montetojn kaj valojn,
varmiĝante teron kaj ostojn,
fekundante grundon kaj korojn.
Mi ŝategas sidpaŭzi eksteren
aŭskultante birdokantojn
frumatene kaj vespere;
rigardi la katon streki kaj ruli sin
en kavo de sunvarma antaŭnelonge
rastita ĝardengrundo,
dum tepida vento suzuras inter la branĉoj de tiliarbo,
kiu jam baldaŭ komencas sian floradon,
allogante milojn da polenigistoj
pro sia mielo
kaj dolĉflara parfumo - metamorfante
tilion en kvazaŭ-vivantan
zumantan organismon.